

AMO 86, Aŭstralio
Esperanto por
peri Oceaniajn
Kulturojn

La legendojn
tradukis: SMG
Kontrolo: Rob Moerbeek

Tri aborigenaj legendoj

- La indiĝenaj loĝantoj de Aŭstralio alvenis el Azio antaŭ proks. 40 000 jaroj
- Tiuj popoloj havis ege fortan ligon kun la unikaj pejzaĝoj, kun drameca floraro kaj bestaro.
- Serpentoj ludas egan rolon en la legendoj, kiel potenca kaj eĉ dangerata besto.

Antwerr- kenh, la flugantaj serpentoj de la Okcidenta Dezerto



Anterrkenh (1)

- La artisto Clifford Possum devenis de la teritorio Anmatyerre en la okcidenta dezerto, lokita ĉ. 200 km, nord-okcidente de *Alice Springs*, kaj la montego Uluru (*Ayers Rock - bilde*). En unu artverko, la artisto bildigas la akvosuĉan terenon Aljupa, kreitan antaŭlonge de du antaŭulaj ĉielarkaj serpentoj.



Anterrkenh (2)

- La vojaĝo de la Flugantaj Serpentoj komenciĝis en Lajamanu, ĉ. 800 km. for de Aljupa ĉe la norda rando de la Dezerto Tanami. De tie la serpentoj aperis multloke, kiel meandrantaj riveroj, tiel formante multajn riverojn kaj riveretojn kaj sekajn riverfluojn, dum la irado ili elblovis aeron el la naztruoj.



Anterrkenh (3)

- La vojaĝo ne nur kreis ter-formojn, sed ankaŭ freŝakvajn sorbejojn kiel Ajupa, kiuj necesis por pretervivado en la dezerto. Preter Aljupa troviĝas nur sovaĝejoj kun sekaj arbustoj, sen akvaj rezervoj. Tio okazis ĉar post Aljupa la serpentoj fuĝis kaj flugis suden - tial la nomo 'flugantaj serpentoj'.



Anterrkenh (4)

- Kono de la lokoj de tiuj akvo-sorbejoj kaj dekoj da pliaj akvofontoj ebligis la lokalizadon en rakontoj kaj kantoj. Tiuj konoj ebligis al la tribanoj de Anmatyerre libere vagadi sur vasta tereno, sur kiu ili havas prizorgajn rajtojn kaj ligojn.



Anterrkenh (5)

- Oriente de Monto *Wedge* estas serio de argilaj tavoloj, kiuj pleniĝas de akvo post pluvo en distanco de ĉ. 20 km. Kelkaj serpentoj estas ligitaj al ĉi tiu teritorio, inkluzive de la bildo montrita en la pentraĵo.



Goorialla
– la
Çielarka
Serpento



Goorialla (1)

- La Songô-Tempa rakonto pri Goorialla estas bone konata dank' al la klasika porinfana bildlibro de Dick Roughsey kaj Percy Trezise. Ĝi prezentas adaptiĝon de la Songô-Tempa rakonto el la nordaj teritorioj kiu rakontas pri la ĉiom-potenca ĉielarka serpento, kiu vojaĝis tra la ebena tereno, serĉante por sia propra popolo.



Goorialla (2)

- Dum la vojaĝo de la sudo ĝis la nordo, ĝi kreis landformojn. Fine, ĝi aŭdis kantadon kaj trovis homojn. Ili varme bonvenigis ĝin kaj ĝi rigardis ilin kanti kaj danci. Li juĝis, ke ili dancas malĝuste, kaj montris la ĝustan manieron danci kaj vesti sin por la ceremonio. Post la dancado, granda ŝtormo leviĝis, ĉiu konstruis simplajn strukturojn (*humpies*) por elteni la ŝtormon.



Goorialla (3)

- Du fratoj ne havis tian ŝirm-ejon. Ĝi trompis la fratojn kaj formanĝis ilin. Pro la timo, ke tio estos rimarkita, ĝi forglitis kun la fratoj interne.

Kiam vekiĝis la klano, ili sekvis ĝiajn spurojn kaj tio gvidis ilin al la bazo de granda monto. La fratoj Goanna sukcesis grimpi la monton kaj trovis ĝin dormanta. Ili zorge tranĉis ĝian stomakon kaj ellasis la du fratojn. Ili estis transformitaj al birdoj, kaj povis forflugi al sekurejo.



Goorialla (4)

- La fratoj revenis hejmen, sed kiam vekiĝis *Gorialla* kaj malkovris sian malplenan stomakon ĝi koleriĝis. Ĝi elpafis fulmon el sia ruĝa lango kaj skuis la monton. Ĝi disĵetis montopartojn tra la tuta mondo, kiuj formis la nuntempajn montojn kaj montetojn. Iuj el la homoj provis kaŝi sin de ĝi per transformiĝo al birdoj, bestoj kaj insektoj, kiuj vivas tie ankoraŭ hodiaŭ.



Goorialla (4)

- Kiam elĉerpiĝis ĝia kolero, restis nur unu monteto. Ĝi glitis suben kaj malaperis en la maron, kie ĝi vivas ĝis hodiaŭ. Nuntempe, la restantaj homoj devas prizorgi ĉiujn el la bestoj kaj vivaĵojn, kiuj, laŭ la Songo-Tempo, estis la sin kaŝintaj homoj. Oni kredas, ke meteoro kiu pafas sin traĉielen estas *Gorialla*, superrigardanta ĉiujn.



Wanampi



Wanampi (1)



- Tio estas vorto en la lingvo Pitjantjatjara, kiu signifas akvo-serponton aŭ serpento-monstron aŭ ĉielarkan serponton. Tiuj estas tre danĝeraj, ofte malamikaj kaj longaj je pluraj centoj da metroj. Estas kredate, ke ili vivas en akvotruoj, kaj gardas ilin.

Wanampi (2)



- Estas dirite, ke Wanampi alprenas la formon de ĉielarko kiam ofenditaj – en tiu formo, ili estas riverencataj de la popolo Pitjantjatjara, sed la Wanampi povas mortigi entrudiĝintojn kaj forpreni ilian animon. La popolo Pitjantjatjara ankoraŭ nun elvokas la serpenton, antaŭ ol viziti la rokotruon Piltati en la montaro *Mann*. Ili komunikas al la Wanampi, ke ili estas amikaj kaj alvenantaj, petas permeson de Wanampi.

Wanampi (3)

- Estas signoj, kiujn ili serĉas, kaj se favoraj, ili pluiras, se ne, ili foriras. Fajro kaj fumo rolas por komuniki kun aliaj familioj kaj la spiritoj. Ĉe Uluru gravas elvoki Wanampi antaŭ la proksimiĝo. Estas malpermesate trinki ĉe la akvo-rezervejo, kie vivas Wanampi.



- FINO